
***Faru kion mi diras, (sed ne kion mi faras)!***

- *Manĝu la supon !*
- *Ne metu la piedon sur la tablon !*
- *Purigu vian nazon !*
- *Lavu viajn manojn !*
- *Ne interrompu la plenkreskulojn !*
- *Respondu per du vortoj!*
- *Tuj foriru el mia vido!*
- *Rapide venu !*
- *Fermu la pordon !*
- *Ne kriaĉu al la kato !*
- *Ordigu vian ĉambron !*
- *Lavu la telerojn !*
- *Demetu viajn ŝuojn !*
- *Ne metu ĉien viajn aĵojn !*
- *Ne ĉiam malfruiĝu !*
- *Venu hejmen !*
- *Ĝentile salutu la sinjorinon !*
- *Mallaŭtigu la muzikon !*
- *Ne ludu per manĝaĵoj !*
- *Kunportu naztukon !*
- *Purigu viajn manojn !*
- *Atentu trapasante la straton !*
- *Lernu la lecionon !*
- *Faru la hejmtaskojn !*
- *Aŭskultu al mi !*
- *Obeu la patron !*



**Kiel mi uzas la materialon *Faru kion mi diras***

1) Unue mi klarigas ke en ĉiu kulturo la gepatroj opinias sian devon eduki la infanojn, ofte pere de riproĉecaj komandoj. Kiujn tiaĵojn rememoras la partoprenantoj el la propra infanaĝo? La listo plilongiĝas kaj spegulas iliajn travivaĵojn, dum ekestas bonhumora etoso kaj reciproka agnosko.
2) Poste mi pretendas esti en ne tro ŝika apartementaro, en kiu tre facile aŭdeblas la vesperaj kvereloj de la najbaraj familioj. Mi parigas la partoprenantojn, donante al ĉiu paro familinomon, kaj infanon sub la formo de stranga pupaĵo staranta surplanke vid-al-vide al ili.
3) Sekve mi rimarkigas ke fakte neniel temas pri edukado de la infanoj (kiuj neniam tiel edukiĝas), sed de povlukto inter la gepatroj. Tiu kiu havas la lastan vorton venkas. Do jen teatreca konkurso inter la paranoj. Tiu fantazia kadro plifaciligas la laŭtvoĉan esprimadon, kiu gravas en lingvolernado.
4) Por prepari la konkurson, mi ripetigas la tutan liston, ofte komik-mimante la malpermesaĵojn kaj tiel forprenante la lastajn barojn. Mi faras tion kun partnero, kvazaŭ ni mem konkursus. Mi aldonas variaĵojn al la listigitaj frazoj (ekzemple: 'ordigu *mian* ĉambron'), kiu senfinigas la eblojn.
5) La nuraj reguloj dum la konkurso estas ke oni ne rajtas uzi la liston laŭsekve, nek ripeti ion jam diritan. Mi laŭ la nivelo de la grupanoj sugestas uzi la liston aŭ la memoron. Ekde kiam la konkurso komenciĝas, ekestas energiplena bruĥaoso, kio faras ke oni multfoje kaj multflanke aŭdas frazojn, ofte komikajn, kio stimulas la imagpovon. Mi mem kriripetas al mia partnero la (korektitajn) frazojn kiujn mi plukis el la bruego, kio estas sufiĉe efika nedirekta korektado.
6) Kiam la energio komenciĝas malaltiĝi, tuj mi ĉesas kaj iras al alia – 'logike sekvinda' – trankvila aktivaĵo.

*************************